



Karaj geamikoj,

jen tute konciza AVENO – detalaj informoj pri ekologio, ekonomio, paco-politiko, Homaj kaj Bestaj Rajtoj, kaj pri Verdaj Partioj troviĝas en la jaraj kolektoj de nia semajna reta AVE-Novaĵoj, same kiel ampleksa kolekto da tiaj dokumentoj en Esperanto en nia retejo **verduloj.org**.

La Asocio de Verduloj Esperantistaj estas malgranda Civil-Socia Organizaĵo; ni estas nura reto da homoj, neformala asocio. AVE-anoj parolas Esperanton kaj estas Verduloj (membroj aŭ simpatiantoj de Verdaj Partioj) favoras ekologian, socialan, pacan kaj viv-subtenan politikon. Ni celas informi niajn geamikojn en politiko kaj en CSO, respektive Ne-Registaraj Organizaĵoj pri la avantaĝoj de Esperanto kaj reciproke. AVE pensas pri la tuta mondo; niaj membroj agas surloke. Ni subtenas por-Esperanto Agadon en Tanzanio kaj D.R. Kongo.

Historio kaj celoj de AVE:

AVE estis fondita 1984 en Bruselo kaj Liège, Belgio, je la unua renkontiĝo de la Eŭropaj Verdaj Partioj – pli je: verduloj.org/ave_hist.htm

Ni informas niajn geamikojn en politiko kaj en Civil-Sociaj Organizaĵoj pri la avantaĝoj de Esperanto, kaj informas niajn esperantistajn geamikojn pri la temoj de Verda Politiko.

Renkontiĝoj de AVE:

2019-07-11 BET, Panevezys: plastajhoj & akvaroj
2019-07-20.. UK, Lahti: AVE-kunveno

Okazintaj:

2018-05-19 Antverpeno, konsilio de la Europaj Verdaj Partioj. AVE partoprenos la organizan foiron per informtablo.

2018-07-29 Lisbono, UK: publika membro-kunveno.

2017-03-30.. Liverpool, Tutmondaj Verdaj Partioj

2015-07-27 Lille, UK: publika AVE-kunsido

Temoj: Dauropovo en la Esperanto-Movado.

1999 ... Kunsidoj de la ekologia frakcio de SAT.

Agado: reta bulteno AVENO informas pri ekologia, sociala, paca kaj viv-subtena politiko de la Verdaj Movado kaj Partioj. ipernity.com > Verduloj

Per-Esperanto-Agado: verduloj.org/afriko.htm
Wangari Maathai, nobelpremiita, instruis, ke rearbarigo estas la kondiĉo por teni la akvon en la regiono, kaj ricevi pli da pluvo kaj trinkakvo.

Mazingira (nord-okcidenta Tanzanio) de Mramba Simba en Salama & Ketare. Agadoj ekde 2007: trinkakvo, biogaso, re-arbarigo, kuiri ligno-shpareme, mikrokreditoj, radio-stacio, sunflora oleo, subtenas operaciojn de infanoj.

Orfoj: daura subteno, pagante 20 lernejkotizon 20/40 Euro jare. Subteno konstruadi la duan mezlernejon „Esperanto Secondary School“.

2016 por pluvakvo-baseno: por ĝardenoj kaj bestoj – lasi grundakvon por homoj.

2017/18 por **internulejo** por lernantinoj – ankoraŭ bezonas meblojn.

2019/20 plano **Rearbarigo** de monto Tirin'gati
Adreso: c/o Mramba Simba Nyamkinda, P.O.Box 51, BUNDA, Tansania. www.kono.be/mazingira/

Kalima, D.R. Kongo, Etienne organizis por reaktivigi agro- kaj fish-kulturadon (PIEADC), kaj trinkakvon: kampanasolidareco.weebly.com
AVE organizis financadon de 4 trinkakvo-projektoj.

2019/20 pli granda 5-a projekto, bonvolu subteni al: www.direkthilfe-freiburg.de

Volksbank Freiburg, BIC: GENODE61FR1

IBAN: DE58 6809 0000 0009 4430 02

Bonvolu noti: Kalima, vian nomon, eble adreson.

„**Uvira**“, Suda Kivuo, D.R. Kongo - Martin Fadhili : **Rearbarigo**, konstruis pli efikajn kuir-fornojn por uzi malpli da ligno-karbo. Li instruas Esperanton; kun lernantoj kultivis arbidojn kaj poste plantis ilin en la regiono de Uvira.

Goma: Psiko-sociala-helpo por traumatataj infanoj, je SBV, PSH projekto de du esperantistaj fakulinoj

Por la **Verdaj Partioj kaj la Movado** ni informas kaj tradukas: Civila Krizo- kaj Konflikto-Solvado ; Ĉarto de la Tutmondaj Verduloj, 2012 (Dakar) : globalgreens.org/globalcharter, 2017 (Liverpool). Ĝenerala Konvencio pri la Komerco en la Servoj; Programoj de la Europa Verda Partio, > 2019; pri Verda & Regionalista EP-Frakcio, 2004-2009; Europo: europeangreens.eu/charter
100 Bonaj Argumentoj kontraŭ Atomenergio; Plastaĵoj k. kemiaĵoj en la maro & akvaroj; Konsiloj pri Efika Uzado de Energio; Dauripova agrikulturo, fekunda grundo; k.a.; 2017 la verda partio en Francio EELV notis: "Nous soutiendrons une langue neutre internationale telle que l'espéranto."

UEA: AVE estas kunlaboranta fakasocio de UEA pri ekologio. Ekde 1998 ni proponadas amendon de la UEA-Statutoj per la temo "dauripovo" - laŭ la Pinto-Kongreso pri la tutmonda naturmedio en Rio de Janeiro 1992, Rio+20, Agenda_21. AVE kunlaboras kun aliaj CSO-oj.

Por **membriĝi** al AVE ne necesas esti membro de iu Verda Partio, sed vi devus akcepti niajn celojn. AVE havas ĉ. 300 membroj. Bonvolu informi nin se vi aktivus (pli aŭ malpli) en iu ajn NRO/CSO aŭ partio. Bonvolu membriĝi en Verda Partio de via lando - vizitu globalgreens.org > About us > Green Federations > via kontinento - kaj partio.

Kontribuoj bonvenaj pere de artikolo kaj kunlaboro, ekz-e en via-landa Verda Partio au CSO. Mi preferas koncizan tekston: (ch..u, cx..ux)

Kotizo: libervole paginda: 10 Euro jare, al la UEA-Konto de AVE: **avex-z** ; ankaŭ eblas al la bank-konto de UEA: ING: BIC/SWIFT: INGBNL2A, IBAN: NL72INGB0000378964.
Bonvolu mencii: (por avex-z, projekto, via nomo)

AVE sekretario: Manfred Westermayer
Kandelstr. 62,
DE-79194 Gundelfingen/Brsg
ave@verduloj.org
retejo: verduloj.org

AVE-anoj pensas tutmonde & agas surloke kaj regione.

